

Jesuo aperas en Galileo post la resurekto

Kiam fariĝis mateno, Jesuo staris sur la strando. Sed la lernantoj ne sciis, ke estas Jesuo. Jesuo diris al ili: Infanoj, ĉu vi ne havas ion por ĉe la manĝo? Ili respondis al li: Ne. Li diris al ili: Elĵetu do la reton dekstre de la ŝipo, kaj vi trovos. Ili elĵetis ĝin, kaj ne plu kapablis suprentiri ĝin pro la amaso da fiŝoj.

Kiam ili estis manĝintaj. Jesuo diris al Simon Petro: Simon filo de Johano, ĉu vi amas min pli ol ĉi tiuj? Li diris al li: Jes, Sinjoro: vi scias, ke mi amas vin. Li diris al li: Paŝtu miajn ŝafidojn.

Joh 21.4-6, 15 (traduko de G. Berveling)

Raphael (1483 - 1520)



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
☎ +420311241406;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

Kio post kvin jarcentoj de disigo	99
La koncilio de Trento laŭ historia perspektivo	105
VE!	113
Sen titolo en la kelo	114
Vespera preĝo	115
Kongresa aliĝilo 2015	117
Bibliaj tagoj 2015 - informeto	119
Dimanĉo, ho unua tag'	120

Redaktoraj vortoj

Unue – mi volas pardonpeti pro la malfruo de la gazeto. Ĝis nun, dum mia redaktado, la gazeto ne tiom malfruis kaj espereble ne plu okazos. Ŝajne mi surprenis sur min tro da taskoj kaj samtempe miaj fortoj estas limigitaj.

Due – la gazeto enhavas du vere longajn artikolojn ĉar mi ne volis partigi ilin kaj publikigi ilin en du sinsekvaj numeroj. Tio ankaŭ signifas ke la enhavo ne estas same varia kiel kutime. Tamen, laŭ mi, la enhavo estas interesa, precipe por ni kiuj ne povis ĉeesti la someran ekumenan kongreson. Por la aliaj – bona ripeto.

Unu el la taskoj, pri kiu mi ekokupiĝis ĉi-semestre, estas ke mi partoprenas en la interlingvistikaj studoj ĉe UAM en Poznan, Pollando. Postuligaj studoj, samtempe interesaj! Plej grave, la partopreno devigas min pli strukture kaj organize plulerni nian lingvon. Dum la redaktado de Dia Regno mi plejofte spertas ke multo mankas al mi. Sendube vi legos pri miaj studoj en estontaj numeroj.

Mi esperas al vi agrablan legadon!

Kio post kvin jarcentoj de disiĝo?

Enkonduka prelego dum la ekumena kongreso, 2014

Philippe COUSSON, FR

Kion mi diros hodiaŭ estas la rezultoj de multaj faktoroj, inter ili miaj propraj spertoj. Tamen ĉefe havas sian lokon la ĵusa dokumento katolika-luterana kies titolon mi tradukas “De konflikto al komuneco”.

Mi komencos per rimarko, kiu validos dum tuta mia prelego: ni foje uzas samajn vortojn por diri malsamajn aferojn, kaj malsamajn vortojn por diri samajn aferojn. Sed povas okazi, ke malsamaj vortoj malkaŝas malsamajn aferojn. Atenti pri la signifo de la vortoj estas grava parto de la ekumena dialogo.

Unua ekzemplo: En la enkonduko al la kongreso kiu aperas sur la retpaĝo de IKUE, mi trovis mencion de la *Semajno de Preĝoj por la Unuiĝo de Kristanoj*. Sed mi persone neniam uzus tiun esprimon. Mi prefere diras *Semajno de preĝoj por la unueco de la kristanoj*.

Kelkaj povas diri: sed tio estas la sama afero. Laŭ mi, tio estas inverse simbolo de kelkaj miskomprenoj, kiujn tiu komuna teksto, raporto de internacia komisiono, provas levi kaj klarigi.

Miavidpunkte, kial ne unuiĝo, sed unueco? Unuiĝo indikas strebon al unueco, al efektiva organiza kaj dogma unueco, kio tute ne estas la celo de ekumenismo. Se miaj katolikaj gefratoj atendas ke mi fariĝu ŝafo de la Papo en Romo kaj de la katolika dogmaro tia kia ĝi estas nun, mi volas konfesi ke tio tute ne estas mia sopiro.

Do ebla miskompreno. Sed ili estas multaj. Kaj pri tio ni devas labori, provi kompreni kion la alia diras, kaj kion per tiuj diroj li signifas, kaj konstati ke eble, foje, ofte, ni diras same, aŭ preskaŭ same, sed per malsamaj esprimoj.

Tiu teksto rigardas al historio de la Reformacio, ĉefe luterana, sed de ambaŭ flankoj, t.e. kion la katolikoj vidis kaj interpretis tiuepoke kaj poste kaj nun, kaj kion la protestantoj vidis kaj interpretis tiuepoke kaj poste kaj nun.

Mi ne sekvos la planon de tiu teksto, sed promenos kun vi inter la diversaj eblaj, kaj foje efektivaj, miskomprenoj inter niaj du kristanaj familioj.

Mi mem ne estas luterano, sed mi apartenas al eklezio



kie unuiĝis luteranoj kaj reformitoj (t.e. kalvinanoj). Mi do iamaniere ligiĝas al tiu teksto. En ĉi tiu unuiĝinta eklezio, la reformitoj restas reformitoj kaj la luteranoj luteranoj, sed ĉar ni konstatis ke ni dividas multege, estus stulte aparte vojiri. Kaj certe post kelkaj jaroj, la kristanoj en tiu eklezio ne plu sentos sin luterano aŭ reformito, sed simple protestanto, aŭ mem simple kristano, kiu vivas sian fidon ene de tiu eklezio.

Por bildigi kion mi volas diri, mi indikas la tradician priskribon de la eklezia historio, kiel ĝi aperas oftege, ekzemple en la bibliotekaj klasifikoj: unue la primitiva eklezio, poste la ortodoksa, poste la katolika roma, poste la protestantaj kaj poste la evangelikaj, tiel ke ĉiu estas branĉo kiu naskis el la antaŭa. Sed neniu protestanto diras ke lia eklezio naskiĝis en 1517. Ne, ili ĉiuj diras ke ilia eklezio naskiĝis en la tago de Pentekosto, do antaŭ du jarmiloj. Eĉ, mi posedas libron, kiu priskribas la historion de la Eklezio kiel: *“la dolora pilgrimado de la fidela eklezio tra la jarcentoj”*. Tio estas, la fidela eklezio, nome la grupoj kiuj rifuzis la establitan eklezion, estas la vera trunko, kaj la diversaj “oficialaj” eklezioj estas fuŝaj kaj eraraj kaj disiĝis.

neniu protestanto diras ke lia eklezio naskiĝis en 1517. Ne, ili ĉiuj diras ke ilia eklezio naskiĝis en la tago de Pentekosto, do antaŭ du jarmiloj.

Lutero kaj Kalvino ne establis novan eklezion. Tion ili ne volis, kaj ne faris. Ili estis bonegaj konantoj de la antaŭaj teologoj, kaj sentis sin filoj de la antaŭa eklezio. Ili volis reformi la Eklezion. Iliaj eklezioj estis la sekvo de la antaŭa, ili ne estis novaj. Sed tio ne estis komprenita, tio estis miskomprenita.

Kio do estas la vera Eklezio, la fidela Eklezio? Tio fakte dependas de la kriterio kiun oni uzas por difini la legitimecon. Ĉu la senĉesa sinsekvo? Ĉu la biblia interpreto? Tie troviĝas unu el la vortaj problemoj.

La dokumento insistas pri la analizo de la vidpunkto. Kiu rigardas? El kiu deirpunkto? Kaj al kiu oni tuj rigardas? Ĉu al tio kio estas komuna, aŭ prefere al tio kio estas disiga? Ĉu al la surfaco, al tio kio tuj videblas, aŭ al la fundo kie radikas la kompreno?

Tio estis la strebo de la ekumena movado. Kaj tio havis rezultojn. Oni povis do alveni al la konkludo ke multo estas komuna, kaj ke tamen restas ankoraŭ disigaj aferoj, malgraŭ la debato pri la signifo de la vortoj kaj esprimoj. La ekumena dialogo senveprigis la amason de miskomprenoj, sed ĝis nun la laboro ne estas finita.

Mi donos kelkajn elementojn, kiuj estas ankaŭ menciataj en la dokumento aŭ kiujn mi aldonas.

Mi parolos pri vorto, kiu inter niaj samtempuloj preskaŭ ne plu havas signifon, la savo. Eĉ jam en la tekstoj de la Koncilio en Trento, oni trovas ke anatemata estu tiu kiu diras ke “homo povas praviĝi antaŭ Dio per siaj verkoj, sen la Dia graco tra Jesuo Kristo”. La diskutoj pliprofundigis tiun temon ĝis

la teksto de 1999: *Komuna deklaro pri la doktrino de pravigo*. “La pravigo venas nur per graco” kaj “nur per fido la persono estas pravigita sendepende de la verkoj”.

Tamen tiu konsento kaŝas miskomprenon. La protestantoj ĝenerale asertas, ke la kristano estas pravigita de la graco de Dio, tio estas: deklarita prava, justa, ekde tiu prenas por si tiun promeson de Dio, eĉ se li restas pekanto, latine *simul justus et peccator*. Por protestantoj, la pravigo estas definitiva. Protestantoj neniam parolas pri proceso de pravigo. Por tio, kion la katolikoj priskribas kiel proceso de pravigo, la protestantoj parolas pri sanktigo. Per la agado de la Spirito, la kredanto estas kondukata cele al la perfekteco. Tiu sanktigo estas proceso. Por protestantoj, la savo ne venas de la agoj, de la verkoj, sed nur de la graco, ĉar ekde iu kredas, tiu estas deklarita prava. La t.n. “Meritoj” ne koncernas la savon.

Alia punkto, kiu en la komenco estis grave disiga, kaj kiu nun aperas multe pli komuna, estas la *sola scriptura*. En la periodo de la Reformacio, la reformatoroj riproĉis al la Romaj teologoj ne plu baziĝi sur la bibliaj tekstoj por starigi dogmojn kaj praktikojn. Unu el la argumentoj de Luther en la diversaj diskutoj (fakte juraj procesoj) kie li parolis, konstante diris: “Pruvu al mi per la Skribo ke mi malpravas”. La Koncilio de Trento deklaris ke la

apostolaj tradicioj estas “konservataj en la katolika eklezio per seninterrompa sinsekvo” kaj ke Skribo kaj tradicio devas esti akceptataj “kun la sama pia sento kaj la sama respekto”. Malgraŭ tio, post jarcentoj, dank'al evoluo de la pensoj ambaŭflanke, oni konsentas ke ne plu estas eklezia monopolo en la interpreto de la Skribo. “Pri ĉi tiu temo, estas unueco en repacigita diverseco”. “Vatikano 2a ne diris ke la Tradicio naskas novajn verojn preter la Skriboj, sed ĝi certigas la veron de la Revelacio atestita de la Skriboj”. Fakte, protestantismo havas sian “tradicion”, nome la diversajn konfesiajn kaj simbolajn tekstojn. Sed ili ĉiam estas konsideritaj kiel komentoj de la Skribo.

Temo, kiun mi menciis en la komenco, kaj kio ankoraŭ nune aspektas disiga estas la Eklezio. Multon oni komune diras pri la Eklezio, Sed ankaŭ multon oni dise diras.

Por protestantoj, la Eklezio estas nevidebla, Tio signifas, oni ne povas difini ĝiajn limojn. Nur Dio konas ilin. Konsekvence, neniu organizo povas diri ke tie finiĝas la Eklezio, kaj plie ke ĉi tie estas la Eklezio. La luterana difino, trovebla en Aŭgsburga konfeso tekstas jene: “La Eklezio estas la kuniĝo de la sanktuloj en kiu la Evangelio estas pure instruata kaj la sakramentoj regule administrataj”. Sama teksto ekzistas en kalvinismo. La Eklezio ne aperas kiel sakramento, kiel mistero. Por Vatikano

Uno en Kristo

2a: “la unika peranto, Kristo, starigis sur la tero sian sanktan Eklezion, komunumon de fido, de espero kaj de amo, kiel videblan organison”. Protestantoj rifuzas diri ke la Eklezio peras la gracon, kvankam ili agnoskas ke dank’ al ĝiaj prediko kaj cerebro la homoj povas konvertiĝi kaj eniri en la gracon. Iamaniere tiel la Eklezio estas rimedo de graco.

Ĉiuj konsentas kun la Biblia esprimo: Eklezio: korpo de Kristo, Kristo, kapo de la Eklezio. Pri tiu lasta esprimo, la protestantoj diras ke la Eklezio havas neniun kapon, neniun ĉefon krom Kristo mem (vi subkomprenu, certe ne la papo).

La Eklezio estas prezentita de la katolikoj kiel la “popolo de la baptitoj”. Eble ĉar la bapto estas ja videbla, ĝi ne povas difini la Eklezion por protestantoj, ĉar en ĝi povas esti nebaptitoj sed kredantoj, kaj al ĝi ne apartenas baptitoj kiuj neniel kredas. Cetere protestantismo estas tiel varia, ke estas protestantaj eklezioj kiuj ne baptas kaj aliaj kiuj diras ke la bapto faras la kristanon.

Tamen restas multaj malakordoj

Por la katolikoj, forte ligiĝas al la Eklezio la temo de la ofico. Mi klarigas tiun terminon al tiuj kies lingvo uzas vorton el la latina radiko *ministerium*. Ministerio havas en Esperanto tute alian signifon. Mi do uzas “ofico”. Kvankam la dialogo inter katolikoj kaj luteranoj alvenis al kelkaj akordoj, rilate ekz. la neceso de ordino, t.e. liturgia ceremonio

kun preĝo kaj mansurmetado por tiuj kiuj predikas kaj celebras la sakramentojn. Tamen restas multaj malakordoj. La luteranoj ne agnoskas la trioblan oficon, ĉar ili diras ke la Biblio ne distingas inter presbiteroj (pastoroj) kaj episkopoj. Por ili la diferenco estas nur laŭ la funkcio. La prizorgado (*episkope*) ne aperas al la protestantoj kiel speciala ofico rezervita al episkopoj. Ĝin plenumas kaj la sinodoj kaj la regionaj respondeculoj, ĉu oni nomas ilin episkopoj, prezidantoj, superrigardantoj. Kaj granda parto de la sinodanoj ne estas ordinitaj.

Mi ne menciis la tiel nomatan universalan sacerdotecon, ĉar finfine katolikoj kaj luteranoj konsentas pri tio.

En la diskuto, ligite kun la demando pri servado, restas la demando pri la eŭkaristio. La komprenoj alproksimiĝis ĉar ĉiu partoprenanto en la dialogo klopodis kompreni la nunan vidpunkton de la alia, kaj la miskomprenojn de la 16a jarcento.

Transsubstanciĝo: vorto kiu originas en la mezepoko por provi klarigi kio okazas kun la kategorioj de tiu epoko, nome aristotelismaj: substanco kaj akcidenso. La substanco estas tio kio kaŝiĝas sub la akcidenso. La akcidenso estas tio, kion oni vidas, sentas. Ili do diris ke sub la vidataj, sentataj pano kaj vino troviĝas ekde la cerebro la korpo kaj la sango de Kristo. Kontraŭe al kelkaj aliaj protestantoj, la luteranoj diras ke la Sankta Manĝo ne estas nur rememoraĵo. Dum tiu ĉi dialogo la luteranoj petis la katolikojn eviti la adoron de la eŭkaristio, ĉar ĝi kontraŭdiras la karakteron de manĝo kiun havas

la eŭkaristio. La katolikoj petis la luteranojn respektive trakti la elementojn post la celebros. Solvo pri tio povus esti la finmanĝo de la elementoj dum la celebros aŭ tuj poste.

Ĉu temas pri ofero (*sacrificium*)? Estis konsento en tio ke ne. Temas pri *anamnezo*, tiu celebros rememorigas la oferon de Kristo sur la kruco, aktualigas ĝin. La ĉeestanta Kristo ĉeestas ankaŭ per siaj vivo, suferoj, morto kaj releviĝo, reale, Tute ne temas pri ripeto aŭ komplemento al la ofero sur la kruco. Tia konsento igas akcepteblaj la diferencojn en la kompreno pri la eŭkaristia ofero.

Pri tiu temo estis ankaŭ diskutoj inter protestantoj, ĉar jam de la 16a jarcento estis malakordo inter luteranoj kaj reformitoj. En la konkordo de Leŭenberg estas ankaŭ parto pri tiu temo, kie oni provas komune priskribi la ĉeeston de Kristo en la celebros.

Malofte traktita en la ekumena dialogo: la rolo de la virinoj en la eklezia kaj liturgia vivo.

Mi volas antaŭ ol iri pluen mencii du punktojn malofte traktitajn en la ekumenaj dialogoj, eble ĉar ili aspektas flankaj. Tamen.

La unua rilatas al la rolo de la virinoj en la eklezia kaj liturgia vivo. Kiam oni atente legas la epistolojn de Paŭlo, oni konstatas ke en tiu tempo, la virinoj partoprenis en la preĝoj kaj en la pre-

diko. Post certa tempo, ili estis forigitaj de la liturgiaj kaj gvidaj instancoj, kaj tio nun estas daŭre la principo ĉe katolikoj. Mi aldonas ke tio validas ĉe kelkaj protestantoj, plejofte evangelikoj. Tio restas falŝtono inter ni. Ĝis la ebleco celebri kaj gvidi estas rifuzita al la virinoj, al ekumenismo mankas unu piedo. Mi ne volas diri ke la katolikoj devas ordini virinojn, mi volas diri ke ili devas agnoski ke en aliaj eklezioj tio okazas kaj validas, tiel kiel ili agnoskas la edziĝintajn pastrojn en kelkaj ritoj.

La dua, eĉ malpli traktata, aperas al mi protestanto kiel eksterbiblia strangajo, en kiu mi tute ne eniras. Temas pri la ritoj, preĝoj, pilgrimoj pri mortintoj, por mortintoj, al mortintoj, ĉu oni nomas ilin sanktulo aŭ ne, inkluzive de Maria. Pri Maria okazis dialogoj. Eĉ la grupo de Dombes aperigis libron pri ŝi. Temis pri ŝia rolo en la vivo de Jesuo Kristo, sekve pri ŝia parto en la disvolviĝo de la graco kaj de la savo. Pri tio ĝenerale estas konsento. Sed ne plu kiam temas pri ritoj ĉirkaŭ ŝi.

Mi ŝatus ke katolikoj, helpe de la Biblio, povus klarigi al mi kion mi ne komprenas.

Mi persone povas aldoni, ke se multaj katolikaj kutimoj kaj kompreno estis al mi fremdaj, ili restas akcepteblaj, krom tiuj ĉi. Ĝis plua klarigo.

Sed, tamen, mi restu pozitiva.

La ekumena dialogo havas la celon de reciproka kompreno. Tio estas, mi ne rigardu la alian el mia propra vidpunkto, sed mi provu ankaŭ rigardi el la vidpunkto de la alia. Vortoj estas danĝeraj, ĉar ili povas esti ambiguaj, dusencaj. Tion oni devas klarigi.

Ni estas kristanoj antaŭ la mondo. Ni ĉiuj. Eĉ se ni ne staras apude, ni por la mondo estas ĉiuj kristanoj. Ni ĉiuj estas atestantoj pri Jesuo Kristo. Ne nur membroj de mia eklezio, de mia konfeso, de mia loka paroĥo, sed ni ĉiuj, ĉu ni volas tion aŭ ne. Ni estas parto de la bildo kiun la Eklezio donas al la mondo. Tio estas nia komuna respondeco.

Mi eĉ volas diri pli. Nia komuna respondeco, nia komuna prioritato estas evangelizo, proklamo de la graco de Dio en Jesuo Kristo. Se ni ne kapablas aŭskulti unu la alian, kiamaniere ni kapablas aŭskulti la mondon por prediki al ĝi?

Sekve, krom aŭskulti unu la alian, ni devas ankaŭ akcepti la diversecon en la Eklezio. Ni devas vivi en repacigita diverseco. La unueco, pri kiu Jesuo preĝis, estas ja promeso por ni, kaj Dia promeso estas efektiva, se ni vivas ĝin.

Ni do devas difini la naturon mem de la dialogo tiel. Ĝi estu la vojo al komuneco, la transiro de konflikto al komuneco. Komuneco ne signifas aprobon de ĉio kio troviĝas ĉe la alia.

Tamen ĉar ekzistas tia ekumena dialogo, tio signifas ke io ŝanĝiĝis, ke oni komencis konsideri ke ankaŭ la alia povas esti kristano, ke la alia estas kristano.

Kaj komuneco ne signifas unuiĝon. La celo de ekumenismo ne estas unu sola eklezio kiu estus la Eklezio. Eble en tio estas granda miskompreno. Por povi atingi tiun eblecon, unue devas disvolviĝi konscio pri la kompleta krist-

aneco de la alia, akcepto de la diferencoj en la kadro de bona ekzegezo, de prava prediko kaj de regula celebrazo de la sakramentoj. Post kiam la konfesioj aperos sekundaraj, tiam la unueco estos ebla, sed ĉu necesa? Ni fakte transiru al preterkonfesia kristanismo.

La origino de ekumenismo troviĝas ĉe protestantaj misioj, kiuj konstatis ke la okcidentaj konfesioj signifas nenion en la misiaj landoj. Ili do kuniĝis en Edinburgo en 1910 por kune pripensi la mision, la disvastiĝon de la Evangelio. El tio naskiĝis post diversaj cirkonstancoj la Ekumena Konsilantaro, al kiu aliĝis ankaŭ plej multaj ortodoksaj kaj malnov-katolikaj eklezioj. Apud tiu strebo, estis katolikoj al kiuj la disiĝo de kristanismo aperis kiel skandalo antaŭ la mondo. Tiuj du streboj baldaŭ kuniĝis, kaj la rezulto kaj antaŭenpuŝo estis la koncilio Vatikano 2a, en kiu la Katolika eklezio enspiris la ekumanan spiriton kaj plene eniris tiun ĉi malfacilan vojon. Tiu ĉi vojo estis kiel tajdo, kun fluo kaj refluo. Sed la atingiĝoj estas realaj, ĉefe en la vivo de la “simplaj” kristanoj. Amikiĝoj, renkontiĝoj, kunpreĝado, kunatestado, tio estas la rezulto de tio ĉio.

La eklezioj sukcesis iri laŭ tiu vojo de konflikto al komuneco, sed la vojo estas longa kaj la fino ĝis nun ne atingita.

Simile al la formulo “prava (aŭ justa) kaj samtempe pekanta” mi diras ke la Eklezio estas diversa, sed tamen unu, ĉar Kristo ne estas dividita. Tio estas vero. Ni do vivu tiel, diversaj sed unu en Kristo. ☪

La koncilio de Trento laŭ historia perspektivo

de monsinjoro Iginio ROGGER

(traduko kaj adaptado de Giovanni DAMINELLI)

Ĉi tiu prelego estas la traduko en Esperanton, de prelego farita ĉi tie de monsinjoro Iginio Rogger en majo 2008 okaze de la kongreso de la itala sekcio de IKUE.

Li estis fakulo pri la Koncilio de Trento kaj direktoro de la Dioceza Muzeo, kiu entenas gravajn atestojn kaj memoraĵojn de la Koncilio. Li parolis en la itala; ni surbendigis lian paroladon kaj transskribis ĝin en nia retejo (www.ueci.it) en la paĝo dediĉita al niaj kongresoj.

La unua notinda afero, estas, ke la perspektivo de la Koncilio de Trento, ekde la mezo de dudeka jarcento, ŝanĝiĝadis, ĉar ĝis la mezo de la dudeka jarcento, historia pristudo de la Koncilio, honesta kaj radikala, ankoraŭ ne ekzistis, ĉar tio estis neebla.

ĝis la mezo de la dudeka jarcento, historia pristudo de la Koncilio, honesta kaj radikala, ankoraŭ ne ekzistis

La aktoj de la Koncilio de Trento, la ĉefa dokumentaro, la tre multenombraj aktoj – ne nur de la 25 sesioj, kiuj estas troveblaj en ĉiu elementa manlibro kun la dekretoj pri la fido kaj la reformo – sed la aktoj de la ĝeneralaj kongregacioj, de la ĉiutagaj debatoj, de la pleno de la ĉeestantaj episkopoj, la aktoj de la teologiaj komisionoj, de la spertuloj pri la kanonika juro, kun la argumentadoj

favoraj kaj kontraŭaj, ĉi tiu vastega dokumentaro je la fino de la koncilio, ne restis en Trento, sed estis translokitaj en Romon, kaj estis, pro kialoj tiutempe kompreneblaj, simple sekvestritaj. Ili estis gardataj dum jarcentoj inter la aferoj plej ĵaluze gardataj en la sekreta vatikana arkivo, kaj ne en la salono de la biblioteko, sed en la fortreso de Kastelo Sankta Anĝelo. Tio pro ordono de papo Pio IV, kiu, tamen, aprobis ĉiujn dekretojn de la Koncilio de Trento; sed kondiĉe ke, neniu en la mondo rajtu interpreti la dekretojn de la Koncilio de Trento, krom la Sankta Sidejo, kiu starigis apartan kongregacion, la Kongregacion de la Koncilio, kiu estis la sola rajtigita doni la aŭtentikan interpreton de tiuj dekretoj.

Kompreneble, esploro pri kiel iris la aferoj, kio estis dirita kaj decidita, kiaj estis la kialoj, kiel ili estis pritraktitaj estis en la deziro de ĉiuj historiistoj.

La fama protestanta historiisto Leopold von Ranke, en la mezo de la deknaŭa jarcento diris klare: historiisto

povas tute flanken lasi tion, kio rilatas al la Konkilio de Trento, ĉar tiuj, kiuj povus verki ĉi tiun historion, t.e., tiuj kiuj havas ĉemane la dokumentojn, ne volas tion fari, kaj tiuj, kiuj volus tion fari, ne povas, ĉar ili ne havas dokumentojn je sia dispo.


Je la fino de la dek naŭa jarcento, papo Leono XIII, malfermis la tutan dokumentaron de la vatikana arkivo, metante ĝin je dispo de ĉiuj fakuloj, katolikaj kaj ne-katolikaj. Ekde la komenco de la dudeka jarcento komenciĝis kritika eldono de la dokumentoj de la Konkilio de Trento fare de la *Societas Goerresiana*, kiu estas societo de germanaj katolikaj fakuloj. Temas pri altvalora eldono ankaŭ laŭ filologia vidpunkto.

Finfine povis aperi veraj historiistoj de la Konkilio de Trento, kiuj povas pritrakti la temon, ne pro apologetikaj kialoj, sed por prilumi tion, kio vere okazis kaj esprimi efektive historian prijuĝon.

La plej klera historiisto de la Konkilio de Trento estis *Hubert Jedin* (1900-1980). Li estas tre bone konata en Trento. Jam en 1945 li partoprenis en la celebroy pri la kvara centjariĝo de la unua malfermo de la Konkilio; sed li venis plurfoje en Trenton jam antaŭ la jaro 1940. Lia spirita kaj fizika ĉeesto en Trento estis tiel kutima kaj merito-plena, ke li estis nomumita kaj honora civitano kaj honora kanoniko de Trento. Kiam en 1970 la provinco de Trento fondis la Ital-Germanan Historian Instituton, li estis ĝia unua prezidanto, kaj kiam li forpasis en 1980, Trento heredis lian personan bibliotekon.

Li verkis la *Historion de la Konkilio de Trento* en kvar volumoj, tradukitaj en preskaŭ ĉiujn modernajn lingvojn. Jedin mem diris pri sia verko: Hodiaŭ la Konkilio de Trento ne plu estas afero pridebatata. Ekde kiam la fontoj de ĝia historio estas je dispo de ĉiuj en la eldono de *Concilium Tridentinum*, ni povas precizigi ĝian historian pozicion kaj ekzameni realisme, kiel ĝi alfrontis kaj solvis la problemojn al ĝi komisiitajn.

La ŝanĝo de perspektivo estis giganta. Jedin mem, kiu, komence planis sian historion en kvar volumoj, unu por ĉiu el la tri periodoj kaj la lasta pri la aplikado de la Konkilio (nomumita trenta reformo), iom post iom alvenis al la konvinkigo, ke fakte, la tiel nomata aplikado de la Konkilio de Trento, estas alia historio, kondukita per aliaj kriterioj, koncernanta alian situacion, pro tio li



decidis en sia verko halti je la konkludo de la Koncilio, ĉar tio, kio venas poste, utiligas la dekretojn de la Koncilio, sed laŭ aliaj kriterioj kaj en alia kontesto. Oni povis diskuti, ĉu tio estas katolika kontraŭreformo aŭ reformo, sed ĝi ne estas simple la Koncilio de Trento.

Hodiaŭ, tiu kiu prenas enmane la temon, rimarkas, ke la Koncilio de Trento ne estas pura kontraŭstaro, sed ĝi estas malpli kontraŭ-protestanta ol tiom, kiom oni asertis en la pasinteco.

Iu ajn, kiu nuntempe volas pritrakti la Koncilion de Trento, povas fari tion laŭ la metodologiaj reguloj de la historiistoj, por ĉerpi, kiel eble pleje, la realon de la aferoj.

La unua diferenco, kiun oni rimarkas en la nova historio de la Koncilio, (kompare kun la antaŭaj pritraktadoj) estas ke, antaŭe, starti de la jaro 1517, t.e. de la tezoj de Lutero pri la indulgencoj, jam ŝajnis troigo, ĉar aŭ oni parolas pri la Koncilio de Trento aŭ pri la lutera revolucio. Male nun, legante la historion de Jedin, oni ekrimarkas, ke la unua volumo, ne nur estas dediĉita al la diskutoj de la protestantoj, sed ĝi reiras al la disputoj pri la reformoj de la Eklezio jam en la unua duono de la dek-kvina jarcento, kun amaso da bruligantaj problemoj kaj pluraj senkonkludaj proponoj de reformo. Oni pensu al paroladoj de Savonarola en Italio, aŭ al la senefikaj reformoj proponitaj de la Kvina Laterana Koncilio fermita ĝuste en la jaro 1517.

Oni devas reiri al la skismo de okcidento kun la deklaroj de la koncilio de Konstanco (1418), kie oni sukcesis reakiri la unuecon de la Eklezio dek-

larante ke:

Unue: la koncilio estas la plej alta aŭtoritato, al kiu ĉiu devas sin submeti, ankaŭ la papo (ĉar tiutempe estis jam du aŭ tri papoj, kiuj kaŭzis disigojn).

Due: la koncilio estas nepre necesa por la Eklezio, pro tio oni devas starigi Koncilion je ĉiu deka jaro.

Ĉi tiuj tezoj, radikale aplikitaj, kaŭzis malfacilaĵojn kaj domaĝojn. Sed, sen prikonsideri ĉi tiujn antaŭfaktojn, oni ne povas kompreni la luteran revolucion nek la Koncilion de Trento.

Alia prikonsidero: En la dek-kvina, dek-sesa jarcentoj, ankaŭ ĉe la katolikoj, ne estas preciza ideo, pri tio, kio estas la Eklezio. Ankaŭ en la piecaj libroj, ekzemple en la “Imitado de Kristo”, libro tiel devoteca kaj kristana de la dek-kvina jarcento, oni nomas eklezio, la preĝejon. Ne estas firmaj asertoj pri la Eklezio, pri kiuj ĝin konsistigas, ĝia rilato kun la sakramentoj, kun la celebroy, kun la aŭtentikeco de la fido. Pro tio oni ne devas miri pri kelkaj radikalaj starpunktoj de la protestantismo: ekzemple pri la pravigo pere de la nura fido, ekskludante, ke estus alio, krom la fido, kiu savas la homon.

Kaj la fido, de kie fontas? De la nura Skribo. El la Sankta Biblio, kiun la popolo plu ne legis jam de jarcentoj, kiu ne estis tradukita en lingvon kompreneblan, kiu ne montriĝis en la liturgiaj celebroy.

Temis pri aferoj pli ol necesaj, sed proponataj en revolucia maniero. Sed de la alia flanko, ĉu estis la kapablo asimili tion? Porti tion en la ĝustajn dimensiojn? Tiel eksplodis la granda

malkonsento, la kontestado eĉ ne de la skriboj, sed de ia maniero mastri la indulgencojn, la pardonon de la pekoj al la vivantoj, la indulgencojn al la mortintoj. Tio aperis iom troe kiel banka komercado. Kaj ĉio tio estas interligita kun la spirita kaj politika situacio de la iama Centr-eŭropo.

En tia kadro, koncilio ŝajnis la solvo. Estis senfinaj pridiskutoj jam antaŭ la jaro 1521. La decida momento estis dum la Dieto de Worms (1520), kie Lutero, antaŭ la Imperiestro Karolo V defendis siajn tezojn. La imperiestro mem, kiu volis gardi la unuecon de la kristanoj, prezidis la Dieton. La papa legato raportas, ke ĉiuj sentas la neceson de Koncilio kiel unika solvo.

Do, oni sin-demandas, kial oni ne starigis tuj Koncilion? Ĉar Koncilio estas nur vorto, sed estas multaj manieroj por ĝin realigi.

Oni devas prikonsideri la internacian politikan situacion, kiu kondiĉis la vidmanieron kaj la sentmanieron de la papa kurio kaj de la papa ŝtato, t.e. la grandan antagonismon inter la habsburga domo, tiama monda potenco, kaj la franca reĝo-lando. La unua klopodo estis solvo per la Dietoj de la Imperio, sed la malfacilaĵo kuŝis en la fakto, ke la Germana Imperio ne estis unueca ŝtato, sed aro de multaj ŝtatoj: grandaj kaj malgrandaj, potencaj kaj malfortaj, ekleziaj kaj laikaj, kie interkruciĝis tre malsamaj opinioj.

En la unua Imperia dieto (1522-23), luteranoj kaj katolikoj decidis unuanime sin teni al la decidoj de libera koncilio. Sed kio signifas libera? Certe por multaj protestantoj, tio signifas libera de la

papo, por la katolikoj signifis libera de tiom multaj mezepokaj reguloj, de kelkaj moroj en la vivo de la Eklezio, kiuj iĝis danĝeraj. Alia kondiĉo estis, ke la Koncilio devos okazi en germana lando.

En la dua Dieto, de Nurenbergo (1524), fronte al la malfruiĝo de la koncilio, oni minacis nacian koncilion en Germanio, pro tio la imperiestro mem, Karolo V, sin devontigis subteni la starigon de koncilio. En tiu okazo oni faris diversajn nomojn pri la loko, kiu povus esti en germana lando ĉe la limo kun la latinaj landoj. Inter la eblecoj aperis ankaŭ la nomo Trento, sed

Ekumenaj Konsiloj de la Katolika Eklezio

Nicea I (325)
Costantinopoli I (381)
Efeso (431)
Calcedonia (451)
Costantinopoli II (553)
Costantinopoli III (680-681)
Nicea II (787)
Costantinopoli IV (869-870)
Laterano I (1123)
Laterano II (1139)
Laterano III (1179)
Laterano IV (1215)
Lione I e II (1245/1274)
Vienne (1311-1312)
Costanza (1414-1418)
Basilea-Ferrara... (1431-'37)
Laterano V (1512-1517)
Trento (1545-1563)
Vaticano I (1869-1870)
Vaticano II (1962-1965)

Koncilio de Trento

Dato: 1545-1563, kun interrompoj

Akceptita de katolikoj

Koncilio antaŭa: la Kvina Laterana Koncilio

Koncilio sekva: unua vatikana Koncilio

Kunvokita de Paŭlo la 3-a

Disvolviĝinta dum la papadoj de Paŭlo la 3-a, Julio la 3-a, Pio la 4-a

Partoprenantoj ĝis 255 en la lastaj sesioj

Temoj pritraktitaj: Protestantismo, Kontraŭreformacio (Katolika Reformo), Sakramentoj, Biblia kanono, Pravigo (Justiĝo)

Dokumentoj kaj deklaroj: sesdek dogmaj dekretoj rilate diversajn aspektojn de la katolika religio.

ankoraŭ estis nenia decido.

Tuj poste okazis la kamparana milito (*der deutsche Bauernkrieg* 1524-25), ĝenerala revolucio de la kamparanoj kontraŭ la nobeloj kun ultrademokratiaj programoj ankaŭ en eklezia kampo. Ekzemple ili volis la rajton nomumi la paroĥestrojn kaj doni regulojn al ilia predikado. Devis interveni forte la *landesfürsten*, t.e. la estroj de la diversaj ŝtatoj, katolikaj kaj protestantaj. Fine oni starigis novan ordon kun novaj reguloj pri la administrado, pri la nomumo de la ministroj kaj de la pastroj laŭ la protestanta sistemo. Post la jaro 1525 estis malfacile por la imperiestro klopodi por sia celo, t.e. por la religia reunuiĝo. Komenciĝis religiaj kolokvoj, ekumenaj renkontiĝoj, komencante de la kolokvo de Aŭgsburgo (1530), ĝis la kolokvo de Regensburgo (1541).

Aliflanke estas la papo, Klemento VII, kiu tro timis la koncilion, pri kiu oni eĉ ne povis paroli. La sekvanta papo, Paŭlo III, fine akceptis la hipotezon de koncilio, tiel ke, ĉe la papa kortego, en 1537 oni pensis serioze pri koncilio, kies

celo estu la reformo de la rilatoj inter la Sankta Sidejo kaj la lokaj eklezioj.

Papa komisiono, nomata “*de emendanda ecclesia*”, asertas, ke la radiko de multaj malbonoj estas la troa papa ĉiopovo en la estrado de la eklezioj de la tuta mondo.

Komprenoble en la ĉirkaŭaro de la papo, oni preferas, ke la koncilio pritraktu nur la temojn pri la fido, kaj oni estas singardaj doni la taskon al koncilio pritrakti la problemojn pri la eklezia reformo.

En 1537 estis kunvoko de Koncilio en *Mantova*, sed ĝi ne okazis pro la malŝato de la Duko de *Mantova*. Pro tio oni kunvokis ĝin en *Vicenza* en 1538, sed ankaŭ tie sensukcese. En 1541, okaze de Dieto en Regensburgo, oni denove diskutis pri la loko kien kunvoki la koncilion. Trento ne estis ŝatata de la Sankta Sidejo, ĉar en lando tro germana, pro tio malmulte kontrolebla. En ĉi tiu Dieto, la papa legato estis kardinalo Morone episkopo de *Modena*, kiu havis precizajn instruojn kontraŭ la elekto de Trento. Sed, kiam li ekkonsciis, ke

granda plejmulto estis favora de Trento, li kapablis konvinki Romon favore de tiu ebleco, kaj fine en 1542 estis la kunvoko de la koncilio en Trento. Oni bone preparis ĝin. La episkopo de *Cava dei Tirreni* estis sendata en Trenton por pristudi la situacion. Li sendis al Romo detalan priskribon de la urbo, de la lokoj: la Katedralo kun ĝia plano kiel ebla sidejo de la konciliaj sesioj, la plano de la kastelo de la Bona Konsilio, interesa priskribo de Trento, pri kio li diras, ke la urbo estas dividita en kvar kvartaloj: tiu de Sankta Maria, de Sankta Benedikto, de Santa Petro kaj de Sankta Viĝiljo; tri italoj kaj unu germana, tiu de Sankta Petro. Pro tio oni povus dispartigi la kunvenintojn laŭ la naciaj grupoj por eviti kverelojn aŭ aliajn malfacilaĵojn.

La kunvoko en Trento de la jaro 1542, estis tre detale preparita, sed eksplodis milito inter Karolo V kaj Francio, pro tio ĉio haltis ĝis la jaro 1544, kiam Karolo V venkis kaj en armistika kondiĉo, devigis Francion partopreni en la Koncilio.

La Sankta Sidejo do, dekretis la remalfermon de la Koncilio en Aprilo de 1545, en la lasta dimanĉo de karesmo (latine nomata *domenica laetare*). Sed la politika mastrumado de la imperiestro, kiu volis partoprenigi en la Koncilio ankaŭ tiujn, kiuj ne volis, precipe la germanajn princojn, malfruigis la malfermon de la Koncilio.

Do, ne en Aprilo, sed la 13an de Decembro 1545, la trian dimanĉon de Advento (nomata latine *domenica gaudere*) la Koncilio povis finfine esti malfermita.

La unuaj sesioj estis dediĉitaj al la precizigo de la programo kaj de ties esenca punkto: ĉu dogmo aŭ reformo?

Oni decidis (ankaŭ se ne ŝatate de la Sankta Sidejo), ke en ĉiu sesio oni estigu unu ĉapitron pri la doktrino de la fido kaj unu pri la reformo. Post ĉi tiu premiso, la Koncilio starigis la bazon de la diskutoj: La Sankta Skribo, la fido en la nura Skribo (sed kiu Skribo, kiu traduko, kian aŭtoritatecon doni al la Skribo kaj samtempe al la tradicio? – grava temo).

Pri la reformo, ni havas deklarojn sufiĉe interesajn: reformo de la predikado, plivastigo de la uzo de la Sankta Skribo en la kristana instruado. Temas pri klopodoj de malfermo al la protestantaj postuloj. Ili estis taksataj tiom aŭdacaj, ke kardinalo Kristoforo Madruzzo, kiu tre intense partoprenis en tiuj iniciatoj, estis suspektata pri emo al luteranismo.

Samtempe, ekstere, la eŭropa politiko estis organizanta militan reziston kontraŭ la protestantaj germanaj princoj, ĉar la postulo de Karolo V estis, ke, se ili ne volas iri al Trento memvole, oni devas porti ilin porforte.

Ĉio tio malakcelis kaj plilongigis la diskutojn, tiel, ke la temo pri la pravigo treniĝis ĝis la fino de la jaro kaj nur en la unuaj tagoj de 1547 ekestis la granda dekreto pri la pravigo. Dekreto pli ol sistema, pli ol digestita; (ŝajnas ke, kelkiuj diris ke, se ĝi estus eldonita dudek jarojn antaŭe, estus evititaj ĉiuj religiaj disigoj).

Pri la reformo, lastmomente, dek tagojn antaŭ la fino de la sesio, oni diris ion, nur por diri, sed malmulton.

Tiel, malblokita la grava baro de la pravigo, oni komencis diskuti pri la sakramentoj; dum la sepa sesio pri la sakramentoj ĝenerale, kaj poste estus alfrontendaj unuope la sep sakramentojn.

Sed en Marto 1547, en Trento ekestis epidemio de ekzantema tifo. Pro tio, de la italaj episkopoj, kiuj malvolonte restis en Trento, alvenis la propono urĝe translokigi la Konkilion al *Bologna*, en la papa ŝtato. Kaj oni decidis tion, eĉ sen peti la opinion de Romo.

Ili transiris al *Bologna*, sen scii, ke ĝuste en tiuj tagoj en Germanio Karolo V venkis kontraŭ la protestantoj en la Batalo de Mühlberg, pro tio li havis la eblon, en la armistiko, devigi la germanajn princojn partopreni en la Konkilio de Trento. Kompreneble tio ne eblis. Oni restis en *Bologna* diskutante senrezulte. La laboroj stagnas ĝis la forpaso de papo Paŭlo III, en la jaro 1549, kaj la elekto de la nova papo Julio III, kiu



estis papa legato en Trento. Tiam, fine la laboroj estis reprenataj, sed intertempe la situacio en Germanio iĝis kriza.

Julio III, kiu, kiel kardinalo Del Monte, subtenis la malfeliĉan translokigon al *Bologna*, nun reportas la Konkilion al Trento. Komenciĝas tiel en 1551 la dua periodo de la Konkilio, kie oni reprenas la laboron pri la eŭkaristio, pri la reala ĉeesto, pri la konfeso kaj la sanktoleado.

Sed ene de la Konkilio estas ankaŭ iom da seniluziigo, ĉar la temoj pri la reformo estas neglektataj. Estas mal-kontento ankaŭ flanke de tiuj, kiuj estas inklinaj akcepti la superan pozicion de la papo. La hispanoj ekzemple plendas, ĉar sentas sin mokitaj: oni komprenigis al ili, ke ekestos reformo, sed ĝi ne estas farita.

En ĉi tiu situacio, en la unuaj monatoj de 1552 la Konkilio stagnas. Intertempe, eĉ helpataj de la katolikega Francio, la germanaj protestantaj princoj ekribelas kontraŭ la imperiestro, estigas inter-civitanan militon kaj la imperiestro devas cedi.

Do la dua periodo dronis antaŭ la timo de la invado de la protestantaj landskneĥtoj, kiuj jam invadis la valon de Inn. Tiel ke la imperiestro mem devis forlasi Innsbruck-on por rifuĝi en Karintio.

Rilate la politikon, ĉio falis, kaj firmiĝis la religia disigo de Germanio. En ĉi tiu drama situacio la du habsburgaj fratoj, la imperiestro Karolo V kaj lia frato Ferdinando, reĝo de Germanio, estis devigataj fari armisticon kun la protestantoj, kies unua klaŭzo estis: “ne ĝenu nin pri religiaj aferoj”.

Ĉio konkludiĝis fine en la paco de Aŭgsburgo en 1555, en kiu estas asertata la principo, ke la religia libero apartenas al la princoj suverenaj ene de la imperio. Ili povos elekti la religion laŭ sia ŝato kaj altrudi sian elekton al sia lando. Temas pri la principo “*cuius regio eius religio*” (kies regado, ties religio).

Tiu dato signas la religian rompon en la germana lando. Sekve de tio, plu neniu interesiĝas pri la koncilio. Eĉ papo Paŭlo IV en Romo, kiu volis apartan tipon de reformo, tute ne volas mencii la Koncilion. Tiel finiĝis la dua periodo de la Koncilio.

Intertempe la religia situacio en Eŭropo degeneris. Naskiĝis alia problemo, ne en Germanio sed en la katolikega Francio, kiu, pro politikaj kaj sociaj kialoj, ekrilatas kun la kalvinistoj. Pro tio, je la forpaso de papo Paŭlo IV, lia posteulo, Pio IV, devas denove alfronti koncilian postulon, ĉar Francio, la katolika Francio, subtenas la idealojn de la Koncilio de Konstanco pri la aŭtonomio de la lokaj eklezioj.

Por ne perdi ankaŭ Francion, oni kunvokas denove la Koncilion. Oni multe diskutas, ĉu ĝi estas la daŭrigo de la Koncilio de Trento, haltigita en 1552, aŭ ĉu temas pri nova Koncilio. En la papa buleo, kiu rekunvokas ĝin, estas zorge evitata la mencio al unu aŭ al alia senco. Nur la koincido de la loko kaj la repreno de la laboroj de tie, kie ili estis haltigitaj en 1552, klasifikas ĝin kiel Koncilio de Trento.

La lasta periodo de la Koncilio estas pli sobra rilate al debatoj inter la katolikoj tradiciismaj kaj al la eksteraj celebroy, sed estas danke al ĉi tiu periodo, ke la Koncilio estas tio, kio ĝi estas, pro tio, kion ĝi kapablis realigi ankaŭ se meze de miloj da malfacilaĵoj kaj fortegaj krizoj, ĉar alvenis la francoj, kun siaj ideoj, tre malfacile akordigeblaj, tamen ne protestantaj.

Notu bone. Estis temo, kiu, en la tria periodo, estis ĉiam preta ekaperi, kaj kiun la Sankta Sidejo volis forlasi, t.e. la temo de la superregado de la papo super la episkopoj, ĉar pro la supernombro de la konciliistoj, ĉefe de la francoj, la diskuto konkludiĝus malfavore al la papo.

Por tiel diri, en la Koncilio, ankaŭ inter la grupo de la prezidantoj, la malsameco de ideoj kaj tendencoj estis tre forta tiel, ke ĝi naskis disigon inter, tiuj, nomumitaj zelotoj, subtenantoj de la superregado de la papo kaj de ĉiuj ekleziaj leĝoj kaj tiuj, kiuj, eĉ rekonante la teologian principon de la unuarangeco de la papo, sentis la nepran neceson



Kardinalo Seripando

Kardinalo Gonzaga



ŝanĝi kaj bremsi kelkajn kompetentecojn de la Sankta Sidejo.

Nur unu ekzemplo: la problemo de la rezidejo de la episkopoj kaj parohestroj. Rezidejo, kiu devus esti en la loko, en kiu ili estis nomumitaj, por ĉesigi la misuzon, pro kio, por financi kardinalon dungitan ĉe la sankta Sidejo, oni provizis al li ĝis sep episkopajn sidejojn, kiujn li tute ne servis. Tiuj absurdaĵoj naskis senfinajn diskutojn kaj kverelojn kaj paralizis la Koncilion. La ĉefo de la zelotoj, kardinalo Simonetta, sukcesis dissemi suspektemojn inter siaj kolegoj, aparte inter la unua prezidanto, kardinalo Gonzaga kaj la ĉefa teologo de la Koncilio, kardinalo Seripando. Tiupunkte ĉio grundis.

La situacio estis malblokita nur pro la forpaso de la du kardinaloj Gonzaga kaj Seripando. La unua forpasis la 2-an de marto 1563 kaj la alia la 17-an de la sama monato. Ilia morto devigis la papon reipensi la tutan estradon de la Koncilio sendante du novajn kardinalojn, kardinalon Naragero, venetiano tre lerta, kaj precipe kardinalon Johano-n Morone, tiu, kiu en 1542 parolis pri Trento kiel sidejo de la Koncilio, kaj kiu, antaŭ kelkaj jaroj, estis akuzita de la Inkvizicio kaj enkarcerigita en Kastelo Sankta Anĝelo en Romo. Tia solvo estis tute alie ol integrisma. Fakte Johano Morone, nova prezidanto de la Koncilio, pleje konsideris la postulojn pri reformo, klopodis repacigi la kontrastojn kaj, trovinte solvon, kapablis estri la Koncilion de Julio ĝis ĝia konkludo en Decembro.

œ

VE!

Ĉu estas mondo fin'?

Kiel besto helpon
petanta mi hurlas
en montpinta groto.

Veeeeeee!

Mi memoras ĉion
kion mi prokrastis.

Veeeeeee!

Ankoraŭ mi devas
tre multe kreadi.

Veeeeeee!

Mi devas surskribi
la muron de l' groto.

Veeeeeee!

Ĉu post la mondfino
kio ja okazos?

Veeeeeee!

Komenciĝos ĉio
denove, denove?!

Veeeeeee!

Ĉu vane mi hurlas
neniu min aŭdas?

Veeeeeee!

Ĉi tie mi estas!

Ĉi tie mi estis...

Veeeeeee!

Veeeeee!

Veee!

Ve!

2014. Sigmond Jùlia

SEN TITOLO en la kelo

Ed BORSBOOM, NL


En la cara Rusio en 1895 junulo eklernis Esperanton. Lia nomo estis Ivan Ŝirjaev. Li aĝis tiam 18 jarojn kaj studis en la seminario de Jaroslavl. Lia fascino por la nova lingvo – Esperanto ekzistis nur 8 jarojn – estis tiel granda, ke li ĝis la morto en 1933* intense okupis sin pri ĝi. Ŝirjaev posedis rimarkindan talenton sur la tereno de literatura verkado. En tiu branĉo multaj esperantistoj estis vokitaj, sed malmultaj elektitaj. Nia ruso apartenis al la lasta kategorio.

Liaj noveloj furoris en gazetoj kaj baldaŭ aperis libro-forme. *Sep rakontoj* (1-a eldono 2006, 2-a 2008), *Tra la loko ensorĉita* (1913), *Forta impresio* (1914). Ŝirjaev montris sin majstro en la vekado de iu maltrankviliga, ĝene prezentanta antaŭsentento. Kutime tuj en la unua alineo



de rakonto, io terura estas anoncanta sin. Disvolviĝas tiu streĉo, nomata suspenso. Inter alie pro tiu eco mi estis kaptita kaj apartenis al liaj admirantoj. Sekve de la unua mondmilito kaj precipe de la komunistigo de la lando samideanoj en Okcidenta Eŭropo ne plu atentis la aŭtoron.

Komence de la 90-aj jaroj mi devis iri por la laboro al Vieno kaj utiligis la ŝancon viziti Internacian Esperanto-Muzeon. Okazis agrabla babilo kun ĝia direktoro Herbert Mayer. En iu momento li demandis “Kion vi pensas pri Ivan Ŝirjaev?” Kiel ŝatanto de liaj noveloj mi respondis “Ŝirjaev, unu el niaj grandaj beletristoj”. Mayer samopiniis kaj menciis sian intencon, eldoni lian romanon *Sen Titolo-n*. “Kie vi



trovis tiun nekonatan manuskripto?" Kaj Herbert rakontis.

Kiam mi fariĝis direktoro de la Muzeo en 1971, mi inspektis la kelon por ekkoni ĉiujn posedaĵojn. Tiris mian atenton kesto, kiu estis tute fermita. Evidentiĝis, ke ĝi devenis el Sovjet-Unio kaj estis sendita en 1933 ĉi tien. La tiama direktoro Hugo Steiner (1878-1969) pro iu ajn kaŭzo ne malfermis la pakon kaj metis ĝin en la kelon. Tie ĝi dormis dum 40 jaroj ĝis la momento kiam mi, la posteulo de Steiner, malkovris la unikan enhavon. La filino de Ŝirjaev estis enpakinta post la patra morto ĉiujn liajn paperojn kaj sendis la tuton al Vieno.

Mayer petis mian kunlaboron en sia projekto pri la eldono de *Sen Titolo*. Jam estis pretigitaj de li la presprovaĵoj. Ilin mi akceptis kontrol-legi. La romano montriĝis pli malpli aŭtobiografia kaj pro tio, ke ni malmulte scias pri Ŝirjaev, la enhavo tre valoras. Ĝi krome donas

raran bildon de la disvastiĝo de Esperanto dum la unuaj jaroj en la rusa regno. Tra la tempo de mia legado aperis la supozo, ke ie kaj ie troviĝas vortoj, kiuj ne staras en la originalo. Por ne bremsi la eldonon mi lasis la diskuton pri tio.

Ĉirkaŭ 2010 aperis artikolo de esperantisto, kiu rekomendis ankaŭ faksimile eldoni la romanon. Ni ja scivolas ekkoni la aŭtentikan skribaĵon de Ŝirjaev. Li konklude suspiris, ke tia eldono ne povus efektiviĝi pro la eta nombro de aĉetontoj.

Verŝajne prave, sed Internacia Esperanto-Instituto volonte presigos ĝin, se almenaŭ 50 samideanoj antaŭaĉetas tiun libron.

IEI atendas la reagojn.

*vidu mian artikolon "Ŝirjaev, la favorato" en Literatura Foiro de junio 1993



Vespera preĝo

dum la ekumena kongreso en Trento,
18-an de aŭgusto 2014

Éva FARKAS-TÁTAR, HU

Karaj Gefratoj, mi ĝojis, ke mi povis veni ĉi tien kaj mi pensas, ke ankaŭ vi ĉiuj tiel prepariĝis, ke ni havos bonan memoron pri la kongreso kiu estas antaŭ ni.

Povas esti, ke estas inter ni koroj ankaŭ kun ŝarĝoj, zorgoj, problemoj kaj ni atendas tion, ke en tiu ĉi amika frateca

rondo tiuj iel malpeziĝos.

Kiam mi prepariĝis pri la hodiaŭa vespero, mi pensis, ke ni povus meditati pri la persono de Sankta Petro kaj pri lia rolo en la lastaj tagoj de Jesuo – sed mi sentas ke ni devas koncentri nian atenton nur pri la fino, tie estas la mesaĝo nun por ni.

Post la vere tre malbela malkonfeso la apostolo certe mem suferis multe kaj post la resurekto kiel li renkontis Jesuon? Li renkontis tiel, ke li estis inter la aliaj apostoloj, Jesuo aperis, alparolis ilin, Tomason eĉ persone kaj Petron ne.

Mi provis imagi kion sentis Petro. Certe estis tre malfacile. Li eble atendis tion, ke ili renkontiĝos persone, li havos riproĉojn, povas esti, ke li iom prepariĝis pri tio, kiel li pardonpetos, kiel li provos senkulpigi sin, do kion li diros al Jesuo. Kaj Jesuo ne alparolis lin. Pasis la tagoj kaj tiam ĉe la lago Genezaret ili renkontiĝas, kiam Jesuo gastigas la disĉiplojn, kiuj venas de la fiŝkaptado kaj tiam Jesuo alparolas Petron.

Kaj ne tio sekvas kion Petro atendis. Nek riproĉo, nek juĝo. Jesuo demandas lin: Ĉu vi amas min? Ĉu eble pli multe ol la aliaj? Petro nenion alian povas respondi: Sinjoro mi amas vin. – Vi ja konas la historion bone. – Ankaŭ duan fojon Jesuo nur tion demandas. Neniun riproĉon li diras. Ne juĝas lin. Nur tion demandas: Ĉu vi amas min? Kaj tion Li demandas ankaŭ trian fojon. Kaj poste

la respondo de la kompatinda Petro, kiu finfine diras: Sinjoro vi ĉion scias (vi scias kiel malhoneste mi kondukis, kiel malkuraĝa mi estis) vi ĉion scias. Sed vi scias, ke tamen mi amas vin, tiel kiel mi kapablas.

Kaj imagu, ke Jesuo ankaŭ tiam nenion diras pri la honto de la apostolo sed donas al li iun taskon, la plej grandan taskon donas al li: gardu miajn ŝafojn! – Kaj tiel finiĝas la afero. Kaj la ŝarĝo de la koro defalas kaj Petro sentas sin kune kun la aliaj en plena potenco inter la disĉiploj. Jesuo solvis la problemon, kaj la sola afero kiu estis grava por Jesuo: Ĉu vi amas min?

Tion mi ŝatus nun diri al vi el la tuta koro: se vi venis ĉi tien eble kun problemoj, eble kun iom paliĝanta kredo, malfortiĝanta amo, eble kun tiuj ŝarĝoj, ke vi ne petis pardonon de iu, estas io malantaŭ vi kion vi hontas, estas iu malagrabraĵo hejme, en la familio, inter la kolegoj, kiun vi ne kristane aranĝis kaj tiu ŝarĝo restis kaj ĝenas vin kaj malfortigas vin, uzu ĉi tiun eblecon, ke ni estas nun ĉi tie en sankta loko kaj akceptu tiun mirindan solvon de Jesuo Kristo, ke por Li nur tio estas grava: Ĉu vi amas min? Kaj nur tion petas – amu min!

Mi deziras al vi, ke ĉi tiu kunestado portu al vi iun refreŝiĝon en la kredo, kaj ke vi denove travivu tiun mirindan senton la plej mirindan en la mondo, kiam la Dia amo ĉirkaŭbrakumas vin kaj ankaŭ en via koro multiĝas kaj kreskas tiu ĉi amo, kiun vi persone ricevis de la Sinjoro.

Jesu aperas en Galileo – la fiŝkaptado. Joh 21.
William de Brailes (13a jc)



21a Ekumena Kongreso

68-a de IKUE 65-a de KELI

1-8/08/2015, Strasburgo (FR)

“Donu al mi trinki” (Johano 4, 7) “La malsameco pliriĉigas min”

ALIĜILO

Familia nomo: Persona nomo:.....

Adreso:

Lando: Telefono:.....

Retadreso: viro virino

Fortranĉu kaj plenigu la dorsan flankon !



La aliĝilon sendu al:

Philippe Cousson, 26 rue de Pre Ventenet, FR-86340 Nouaille-Maupertuis,
Francio aŭ al retadreso: philippe.cousson@sfr.fr

Al la kongreso invitas KELI kaj ankaŭ IKUE. Partopreni povas krome ĉiu esperantisto, kiu volas ĝui kristanan medion en belega eŭropa urbo.

La kongresejo estos: junulardomo CIARUS, proksime al la centro de la urbo.

Sumoj (EUR) (La aliĝo validas nur post la pago de garantia sumo) Restadkosto

	ĝis 31.12.2014	ĝis 1.4.2015	ĝis 1.7.2015	
Kategorio A :	20	30	40	290
Kategorio B :	50	50	60	420 (480)*

Kategorio A: ekssocialismaj landoj, Afriko, Sudameriko

* unuĵita ĉambro

Kategorio B: ĉiuj aliaj landoj

- pago al UEA konto de FEEL (tio estas franca sekcio de KELI): feel-w
- aŭ al banka konto de FEEL: IBAN FR06 2004 1000 0110 4561 5U02 088,
BIC PSSTFRPPPAR

Mi planas alveni: aviadile trajne buse mia aŭto aŭto de

Mi mendas ĉambron: 1-litan 2-litan 3-4 -litan | Mi NE tranoktos:

Mi akceptas dormi en supra lito: JES NE

Mi preferas loĝi kun:

Mi estas vegetarano: JES NE

Kroma informo pri manĝado:

Organizaj informoj

Mi estas preta gvidi preĝojn: JES NE

Mi povus prelegi pri:

Mi postulus / havas specialajn dezirojn:

Dato: Subskribo:

El provizora programo:

- oficiala malfermo de la kongreso
- interkona vespero
- Diservoj
- prelegoj, kantado
- koncertoj
- jarkunveno de KELI kaj IKUE
- tuttaga busa ekskurso
- vizitoj en la urbo
- renkontoj kun la lokaj esperantistoj
- partopreno en loka ekumena vivo
- kaj kion vi krome alportos

Bibliaj Tagoj kun ADORU 2015

Okazos de la 15a ĝis 19a de aprilo 2015, en belega freŝrenovigita, historihava domo, mastrumita de fratulinoj, proksime de la katedralo, do tute centre de la bela urbo Wrocław en Pollando. Se vi havas interreton vi vidu: www.ndwroclaw.com

Biblia temo verŝajne estos la fina libro de la apokalipso (=revelacio, malkaŝo) de Johano.

Krom matenaj bibliaj prelegoj kaj interŝanĝoj, kaj ĉerpado el la kantaj kaj liturgiaj riĉaĵoj de ADORU, ankaŭ ne mankos tempo por enurba turismumado, kontakto kun diversspecaj lokaj kristanaj evt ankaŭ judaj tradicioj, kaj amikeca kunestado.

Prezroj por partopreno, loĝado kaj kompleta manĝado estos 130 € por okcidentanoj kaj 90 € por orientanoj (resp. por poloj zlota egalvaloro).

Kaze de demandoj aŭ aliĝo ne-formala, oni turnu sin rete aŭ poŝte al:

Stefan Lepping
Mellinstr 5
D-59457 Werl
Germanio
stefanlepping@gmx.de

El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

26. oktobro

Ho amanta Dio, estu kun la homoj, kiuj vivas flanke de la socia vivo. Pro nia malatento ili ofte devojiĝis. Pardonu nin kaj kompatu ilin. Ankaŭ por ili estu loko en niaj koroj. Ni neniam malestimu ilin, sed dediĉante ilin al Vi, ni helpu, kie ni povas kaj kapablas.

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 98).

Tiel Vi subtenos la agadon "Stichting Zienderogen" iniciata de Jaques Tuinder.



Dimanĉo, ho unua tag'

(originale verkita)



1. Di - man - ĉo, ho u - nu - a tag',
Ho tag' de l' ba - za kre - a ag',



ho tag' de l' mond - es - ti - ĝo!
ho tag' de l' lum - fa - ri - ĝo!


refreno:



Ĉi ti - un ta - gon fa - ris Di'.



Ga - ji - ĝu, ĝo - ju ni en ĝi,



kan - tan - te: Ha - le - lu - ja.

2. Sinjora tago, tag' de l' glor',
ho tag' de l' releviĝo!
Ho tag' de l' paska rememor',
ho tago de l' viviĝo!

3. Hodiaŭ ni, la kristanar',
la tuta eklezio,
kunvenas por la sankta far'
de l' Dia liturgio.

4. Kun Kristo, Vorto, Pan' kaj Vin',
ni iru nun en paco,
por forte priatesti Lin.
Kuniros Lia graco.

DIMANĈO, HO UNUA TAG' • M: Peter Sohr 1668, nGL (Speyer)
802 • E (originale verkita): Kloster Kirchberg 2014-09-11.
Gen 1,3.5 • Psa 118,24